

Oktobro 1953a N-ro 2

LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Giro Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

Originaleco de Francaj Junuloj

de Roland Pierre.

Se mi ricevas leteron kun demando pri la originaleco de francjunulaj faroj, mi komence serĉus respondon al akcesora problemo: „Ĉu mia korrespondanto deziras objektivan dokumenton, ĉu akuzigan diskutemon?“ La dua sinteno devigus min ĉion pligravigi, sekve mi kompilis ĉiujn provojn abortitajn pardonante ties malsukcesojn pro la nekomprenemo de oficialuloj, kaj gloron donus al ĉiuj ŝajnebrilaj junulasocioj.

Mi supozu nun, ke certe mia demandinto estas senpartia persono; mi do unue rimarkigu, ne zorgante pri ekster Francujaj okazintaĵoj, ke antaŭ kvindek jaroj, oni kalkulis la junulojn nur kompare kun iliaj antaŭuloj. Post diversaj sociaj ŝanĝoj, kaj influo de fremdaj iniciatoj, je la komenco de tiu jarcento oni ekkomprenis la rajton por seneksperimentaj junuloj ĝui vivmodon iel malsaman de tiu de la pliaĝuloj, tion cele de memeltrovo de la bezonata eksperimento.

Tial la junularo ekvidis sin en aparta respondeco kaj vekigis subite revante pri misio por plenumi. Ĝi ne detale sciis pri ĝi, kaj interesis pri diversaj metodoj de fremdlanda de-

veno (kiel jam dirite): skoltismo, konkurssporto kaj grupsporto, „caravanning“, kampismo, turismo, interŝanĝoj diversaj. Post duonjarcento, ni do rajtus admiri la apogeon de nia junularo. Se ni ne atingis tian punkton, sed tamen konsideras daŭran movon de la junularo, ni demandu nin kial la antaŭenpuŝo ne trafis pli superan etaĝon. Lojale respondon ni tiam faros, akuzante ke ĝi, la junularo, ne ricevis idealon.

La „Instrukcio Publika“, t.e. la oficiala instrukcisistemo, helpis plialtigi la intelektan nivelon de la popolo, kaj krei elstaran intelektularon, sed la sisteme ligita senfrukta moralo, kiu estis kaj plu estas uzata por la civitana instruo ne sufiĉis por naskigi entuziasmon. Cele al samaspektigo de la cerboj, oni ne malhelpis kreskiĝon de diverseco en konsciencoj; kaj tiu konsidero rekondukas al la unua demando.

La originaleco, eble unika, de la franca junularo, estas ĝia senespera serĉado al vivkaŭzo kaj agado. Sur ĉiuj terenoj kaj je ĉiuj aĝoj, de la infaneco ĝis la maturiĝo, ĝi multobligas la provojn kaj strangaĵojn, lernante sinsekve apud majstroj, kies

spiritoj estas nesamaj, eĉ iam kontraŭaj. Ĝi tiel atendas, ke unu kaŝu la aliajn, kaj ĝin instruu pri la senco de l'ekzisto.

Tial, en ĉiuj movadoj, asocioj, ni renkontas malplimulton konvinkatan kiu konsumas siajn fortojn por vekii plimulton skeptikan kaj indiferentan. Tial, inter ili, la multo, lacigita de la malcedemo de l'unuaj, kiu volas ĝin persvadi ke nenio estas serĉota, kaj ĉio jam trovita tiu multo flankeniras por kaŝi venĝemon, al filozofsistemoj kiu instruas ke neniam oni trovos ion, do ke ne valoras serĉi. Eĉ multaj ŝajnas aniĝi al progresema sistemo, sed nur obeas aŭ strangan kaj distraĉan modon, aŭ molan liberon de moroj kaj sinesprimado. Ili ŝajnas esti ribelistoj, kvankam mankas al ili la ĉefa kondiĉo de ribelo, la konfido al neakceptata vero.

Tamen tra tiuj originalaj, lacemaj spiritoj, oni povas trovi la kelkajn kiu, post la malespero, kaj rekoninte la realaĵojn okaze de la malŝancoj de vivo, tiam refoje demandas al si: kion celas la junularo, kion ĝi devas ricevi por agi kaj ekĝui vivon, kaj kiu idealo sin trudas al ĝi?

Similaj al tiuj esploristoj, ekirin-

taj sen manĝaĵoj nek armoj, revenintaj malfacile, preskaŭ mortigitaj pro malsato kaj varmegaj pro febro, kiu tiam verkas metodan libron de la bona esploristo, tiuj kiu malsukcesis en la juneco, kaj la junuloj mem duonsukcesintaj eble iam konsentos fariĝi la gvidantoj de nova, fruktodona generacio.

Tiam oni povos konkludi, ke la faroj kaj pensoj originalaj de la junuloj en Francujo: nekalkulado pri orplena estanteo, nekonfuzado de feliĉo kaj facileco (kion faras multaj fremdaj kamaradoj), konsento pri malsufiĉo kaj ties pruvado, esprimo senkaŝa de siaj ideoj, kaj memvola malsaĝeco, aŭ cinika deklaro, ke mondo kaj vivo ŝajnos al ili absurdaj ĝis kiam oni proponos al ili memracian reĝimon, dinamikan fidon kaj pozitivajn principojn, tiam oni povos diri, ke tiu aro da provoj, serĉadoj, tiuj neoj kaj tiuj aspiroj, ne malutilis kaj helpis al finstarigo de pli-bona mondo.

Franca STUDRONDO
Amitiés FRANCE-MONDE".

Sidejo:
205, Rue Saint Denis
COLOMBES (Seine).

Nia kontribuo al la movado.

Danke al gesamideanoj, kiu sendas al ni regule legitajn numerojn de „La Juna Vivo”, ni estas informataj pri Esperanto movado inter junularo de la mondo.

Ni ĝojas pri viaj sukcesoj, en pensoj ni kunestas dum viaj renkontiĝoj. Kvankam malantaŭ fera kurteno, ni kun vi komune volas progresigi la movadon, helpi al vi, eble ankaŭ konsili kaj instigi al pli profunda kuntenema agado.

Vi scias, ke nia movado estas malfavorata en nia lando. Vi scias mul-

ton pri nia suferado, sed vi apenaŭ povas imagi ĉion. Ni estas e-istoj preskaŭ sen literaturo, sen lernolibroj kaj vortaroj, sen organizaĵoj, sen personaj rilatoj internaciaj. Tio multe ĝenas nin, sed entute ĝi signifas ne multon. Se ni volas esplori aferon de Esperanto en Ĉeĥoslovakio, ni devas konscii, ke e-istoj tie suferas pro tio, ke Esp. estas konsiderata ilo kosmopolitisma, do reaktiva. (Noto de la red.: Estas interese, ke dum la propagandado de Esp. en Nederlando mi tre ofte aŭdas la re-

futon: „Ni ne volas lerni E-n, ĉar ĝi estas lingvo de la komunistoj!” Per persisto kaj amo ni certe sukcesos konvinki la homaron, ke E. estas nek lingvo de la reakcio, nek de la komunistoj, sed simple lingvo de la interfratiĝo.)

Pro esperantisteco ni estas ie suspektataj pri kontraŭŝtata agado. Multaj el niaj vicoj timiĝas kaj forlasas la movadon. Por ekkomprenigi la situacion, ni devas tuŝi ankaŭ politikan kaj ekonomian vivmanierojn de Ĉeĥoslovakio ... Mallonge dirite: la vivo igas homojn lacaj de peniga kaj longa laboro kaj ŝtatpartia propagando, seninteresaj. Jes, al multaj homoj mankas intereso kaj ankaŭ energio por fari ion kromokupan. Poste ekzistas ankaŭ tiuj, kiuj konsideras Esp.-rondetojn filioj de la partio kaj foriĝas. Malgraŭ la ĝenoj tamen estas multaj centoj da fidelaj gesamideanoj, kiuj semas kaj ne lacigias.

Hodiaŭ mi volas skribi precipe pri junularo. Unue mi devas aldoni, ke la leĝo ne permesas organizi sin libervole. Sola organizo por junularo en la tuta respubliko estas Ĉeĥoslovaka Asocio Junulara. Do junaj e-istoj ne povas formi organizaĵon. Kaj tamen floras junulara movado inter ĉeĥoslovaka e-istaro.

Komenco de ekfloro ne estas en malproksima estinteco. Nia viglado daŭras proksimume tri jarojn. Depost ekesto de malfavoraj kondiĉoj ni konscias neceson forte teni la verdan standardon. Do ne libera agado, sed tiu - specca mallibereco donis al ni forton, energion kaj ĝustan decidemon.

Teorie ekzistis junulara fako ĉe EAĈSR, sed praktiko pruvis, ke temas nur pri morte naskita junularskeleto.

Kaj kia estas la situacio nun?

Mi ne diras, ke ekzistas tutŝtata organizo de Esperanto-Junularo. Multaj gejunuloj gvidas E-rondetojn ĉe Klerigaj Domoj kaj ĉe Uzinaj Kluboĵ de Revolucia Sindikata Movado; kelkloke en tiaj rondetoj laboras nur junularo. Kaj ĝi ne ŝatas izolitan agadon. Male. Ĝi forigas izolemon kaj serĉas kontakton kun ceteraj grupoj junularaj. En la tuta respubliko estas reto de tiaj junularaj grupoj kaj ties delegitoj. Laŭ situo unuopaj grupoj kreas regionojn, kie kunlaboron gvidas regionaj delegitoj. La movadon direktis ĝis nun anstataŭ centro nia ĉefdelegito. Gravaj helpiloj por la agado estis regionaj cirkuleroj - ciklostilitaj gazetoj - entute sep. Bedaŭrinde sekve de registara aranĝo lastjare ne eblis eldonadi tiom da cirkuleroj, do nur la centra „Tagiĝo” gvidis nin, informadis kaj konsiladis. Krom kelkaj regionaj konferencoj okazis ĉiujare tutŝtata konferenco de junularo.

Nombro de delegitoj kaj gastoj estis ĉiam ± 100 aŭ pli. Nian sistemon de kunlaboro partoprenas 25-35 grupoj kun pli ol 600 membroj. Jes, ni ŝajne estas malmultaj, sed kredo, se ni povus nun labori en viaj kondiĉoj, se ni povus nin vere libere organizi, nia nombro estus dekobla. Konsciu, ke ne ĉiu rondeto kunlaboras kun ni, ke multaj timemuloj forlasis la movadon kaj ke ni ne kalkulas individuajn izolulojn. Ni kredas je nia forto kaj tio kuraĝigas nin.

Kelkaj samideanoj ĉe ni dividas laboron je poresperanta kaj peresperanta. Unuj emfazas la unuan, aliaj la duan. Laŭ mi tia diskutado estas superflua kaj la junularo ĝenerale samopinias. Ni akcentas servemon al la nacio kaj ŝtato, ĉar tio garantias almenaŭ toleradon de Esperanto. Nia porpaca laboro estas sincera, kvankam imago de paco ne ĉiam

konformas kun paco de tendencaj „konferencaj” pacbatalantoj.

Sur unua loko de pasintjara konferenca rezolucio estis jeno: „Daŭre pliprofundigadi sciojn lingvajn kaj funde ellerni la lingvon.”

Perfektigon kaj plifortigon ideologian ni devas emfazi, ĉar en nunaj cirkonstancoj nia kresko estas limigita. Ĉi-jara Konferenco de Esp. Junularo (jam la 4a) okazis en kastelo de Hradec u Opavy. En ĉi tiu belega loko, kies ŝtonaj muregoj sonas per jarcentoj, kie prezentas sin emociiga historio de la silezia regiono kaj kie krom diversa nobelaro restadis ankaŭ la edzino de potenco ĉeĥa reĝo Premysl la IIa, Kunkuta (en 13a jarcento), kie vivis kaj komponis ian tempon L. v. Beethoven kaj ankaŭ Franz Liszt, tie nunjare kunsidis niaj junularaj delegitoj kaj multaj gastoj.

Sabate, la 1an de aŭgusto estis aranĝita la kutima Interkonatiga Vespereto. La kultura programo estis tre altnivela. Granda merito pri tio apartenas al ĉiuj prezentintoj - gekantistoj, aktoroj, muzikistoj, parolintoj, ktp. kaj al la aranĝanto de la entrepreno: al Junularo Opava. Sekve de tutjara konscia lingva perfektigado ni decidis intertrakti dum dimanĉa konferenco en Esperanto.

Malfermo post la 9a, bonvenado kaj ni komune kantis la „Kanton de Esp. Junularo”:

Ni, Esperanta Junularo
sub signo de la verda stel',
kaj en frateca solidaro
kun kanto marŝas al la cel'.

Venu al ni, juna kamarad'
sub verda stelo via lok',
helpu en la paca batalad'
por granda ŝanĝo de l'epok'.

Kaj fidas nia juna koro
al forto de la juna brak'.

La stelo estas la aŭroro,
jen, venas jam la suna tag'.

Ĝi estas pen' por celo nobla
kaj se multigis nia rond',
eĉ forto iĝos centmil-obla,
el kiu kreskos la estont'.

Venu al nia juna kamarad'

Ĉi vortoj montris al ni la celon de nia penado, ili donis en nian koron amon, entuziasmon kaj optimismon. Ili plenigis niajn brakojn per forto. Kaj kun pura sento kaj klara vido ni konsideris la faritan laboron. Delegito post delegito ekstaris kaj konigis al ni la rezultojn kaj spertojn de sia grupo. Post valorigo de pasinta jaro ni elektis la plej viglan grupon junularan. Laŭmerite oni elektis Junularon de Opava, kies delegito dum ĝoja aplaŭdo transprenis premion de la ĉefdelegito. (Koran gratulon ankaŭ nome de TEJO. La red.).

Multaj problemoj aperis kaj oni bezonis multe da tempo por solvi ilin. Denove estis honorigataj gesamideanoj el Opava, sed kun la honoro ili ricevis ankaŭ laboron: gvidi la junularan movadon en nia lando. La decido estas ĝusta, ĉar individuo povas nenion organizi, aŭ presigi en nia lando. Tion darfis tamen laŭleĝa kolektivo.

La kunsidon fine regis vigla parolero kaj la intenco kontribui nian movadon. Ĉerpante fortan esperon el vortoj kaj sonoj de nia himno esperantista, ni fermis la konferencon 1953. En nia rondo regis vera bonhumoro, ĉie montriĝis amikeco, gajaj vizaĝoj kaj plenespere aŭdiĝis: „ĝis la revido!”

Post la konferenco okazis en ĉarmega ĉirkaŭaĵo, en belega valo de montara rivero Moraviec, junular-tendumado. La celo estis ne nur perfektigi en Esp. sed ĝi servis por nova celo: eduki bonajn gvidantojn por

nijaj junulargrupoj. Gesamideanoj el diversaj lokoj de nia lando lernis tie organizajn aferojn, fruktedonan propagandmanieron, instrumetodojn. Por ke ili povu labori por Esp. en nia popoldemokratia lando, ili lernis defendi E-n el vidpunkto de marks-leninismo kaj lingvoscienco de Stalin. Ili lernis diskuti kaj argumenti, ili lernis pri historio kaj literaturo de Esp. kaj pri la nuna tutmonda stato de la movado.

Realigis ankaŭ diskutoj pri nunamano de organizita kunlaboro. El iniciato de iu samideano el Ostrava proponigis nova organiza sistemo, kiu sin bazas sur tutstata konkurso de niaj grupoj. Pri ĉi temoj oni traktis dum du kunsidoj, nome en la tendaro kaj poste en Opava. La propono estis akceptita kaj entute ĝi prezentas ion eksterordinaran. Mi opinias, ke Esp.-junularo de neniu lando havas tiom perfektan organizon. La sistemon ni prezentos al vi post akiro de unuaj praktikaj spertoj. Dume ni penas enkonduki ĝin.

Instruado estis plejparte Esperanta, sed dumtage ofte aŭdigis la ĉeĥa lingvo. Oni diradis „ho, se estus ĉi tie eksterlandanoj, ni parolus nur

verde”. Bedaŭrinde tio estis nura revado. Nur en revoj ni flugis al Wörgl kaj Zagrebo, nur en pensoj ni partoprenis la tieajn solenaĵojn. Kiom da ĝojo alversigis, kiam iu samideano ricevis salutkarton el Zagrebo kaj eĉ kun nova Esp. poŝtmarko. Ni kompatindaj izolitoj! Kion ni donus por kelkaj momentoj de kongrespartopreno!

Estas konate, ke mankas al ni internaciaj rilatoj. Ni kredas, ke ni ĝis atendos situacion pli bonan. Ni ja estas esperantistoj. Dume ni devas efektive eluzi korespondadon, kiu sola povas nin kunligi reciproke. Tre grava kaj vere ŝatata ligilo estas krom „Heroldo de Esperanto” ankaŭ „La Juna Vivo”, kies legitajn nrojn ricevas multaj delegitoj de niaj grupoj. Ĝi estas verda lumradio, kiu ĉiumonate alportadas kvanton da nova Esperanto-energio por niaj junaj koroj. Al donacantoj ni esprimas dume nur dankon, sed kredu, ĝi estas samideane sincera. Nia komuna devizo estu: „Fortiĝu kunlaboro de tutmonda Esperanto-Junularo!”

Via AGLO.

Mallongigita. Red.

Letero de ĉeĥa samideano:

Kanto de la Esperanto-Junularo.

En La Juna Vivo mi legis plendon de iu samideano, ke Esperanto-Junularo ne havas konvenan himnon. Ĝisnuna Kanto tiufunkcia, laŭ artikolo, ne taŭgas, ĉar ĝi ne estas originala kaj ne temas nian movadon. Mi mem ne konas tiun ĉi kanton, sed mi kredas al la skribinto, ke estas tiel, kiel li skribis.

Legante ĉi tion, mi tuj ekpensis pri alia kanto, kiu tute konsentus kun la kondiĉoj deklaritaj en la artikolo. La kanto estas himno de ĉeĥoslovaka Esperanto-junularo, kaj oni ĝin ofte kantas ĉe ni oficiale eĉ neoficiale. Ĝi estas pura originalaĵo, ĉar muzikon komponis muzikema ano de Praha-

Junularo Jaroslav Šmejkal kaj la vortojn verkis fama ĉeĥa esperantisto D-ro Tomáš Pumpr. Kaj ke ĝi temas plene nian movadon vi mem povas vidi. Pri beleco de la muziko kaj la vorto juĝu vi mem, sed espereble ĝi plaĉos ankaŭ al vi tiom, kiom al ni. Pri taŭgeco de ĉi kanto atestas ankaŭ la fakto, ke ĉiuj, kiuj ricevis ĝin en eksterlando esprimigis tre favore por ĝi.

Mi petas la redakcion de LJV, ke ĝi proponu en sia gazeto la kanton al la legantaro kaj TEJO por prijuĝo kaj akcepto kiel oficialan himnon. Sed plej ĉefe eklernu kaj kantadu ĝin!

... (la saman tekston sendis hazarde ankaŭ alia ĉeĥa amiko. Vi povas ĝin legi en artikolo sur paĝo 16).

ORGANIZAJ INFORMOJ:

Adressanĝigoj: La adreso de nia prezidanto ŝanĝiĝis. Adresu la leterojn nun al Vaandrig T. K a n t e r, Naarden, Juliana v. Stolberglaan 9. Nederlando.

Niaj amikoj Felix Kat kaj Geert de Vries bedaŭrinde estas malhelpataj. Ilia studado ne plu povas toleri prokraston.

Nederlandaj TEJO-anoj ne lasu nian prezidanton sola, helpu lin. Li estos danka al ĉiu serioza helpanto.

Dokumentado kaj Gazetarservo: Zorganto: Mich. Duc Gominaz, 12. Place de la République, Paris 10e. Francujo.

Raporto pri la laboro de D.G.-Servo estis farata okaze de la Wörgl-a kongreso. Ekster tiu raporto jen kelkaj novaĵoj pri la vivo de la landaj sekcioj:

Depost januaro 1953. aperis bultenoj de landaj sekcioj en Francujo kaj Nederlando. En Britujo la helpperanto s-ano Brian A.O.! Sullivan sendis cirkuleron „leteron al ĉiuj junaj esperantistoj en Britujo” anglalingve, en kiu li instigas la junulojn al laboro.

Landa renkontiĝo de la Nederlanda Sekcio okazis en Elst la 23-24-25-ajn de majo. Regiona renkontiĝo de la Orientfranca Sekcio okazis en Strasburgo la 12-13-14-ajn de julio. La Pariza-sekcio organizis kurson por komencantoj dum 1952/53 (finis 4 lernantoj) kaj planas pli grandskalan kurson por la venonta jaro. La D.G. estas en konstanta rilato kaj kunlaboro kun la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Junularo, kiu estas tre aktiva kaj havas 29 grupojn kun 654 membroj. Somera renkontiĝo okazis en Prerov; la cirkulero „Tagiĝo” de Esp. Junularo uzas la gazetarservon de TEJO.

Nun mi turnas min al la perantoj de TEJO:

Ĝis nun la kunlaboro de la perantoj ne estis sufiĉe efektiva. Mi memorigas, ke la perantoj devas sendi al la D.G.-Servo ĉiujn informojn kaj dokumentojn pri la vivo de la landaj kaj regionaj sekcioj kaj raportoj pri la maniero, kiel ili uzas la Gazetaran Bultenon, ĉar tiu ĉi estas utila nur se ĝi estas uzata. La ĉefperantoj bonvolu noti:

1. mi atendas de ili raportojn;
2. ili bonvolu sciigi al mi senprokraste kiom da ekz. de la Gazetara Bulteno ili bezonas (por dissendo al la nacia esperantlingva gazetaro kaj al la regionaj perantoj). Ĝis nun mi sendis 4 ekz. al ĉiu, sed eble kelkaj bezonas pli kaj aliaj malpli. La papero estas kosta. Bonvolu nepre respondi pri tiu punkto. (Demando de la redakcio: Kial la red. de LJV ne ricevas la Bultenon?)
3. Oficiala raporto en Esp. pri la Wörgl-a kongreso estis sendata al ĉiuj Esp. gazetoj en la mondo. Ĝi ne estas sendata principe al la ĉefperantoj. Sed se ĉefperantoj, perantoj, aŭ membroj bezonas ĝin por ĝin traduki en nacian lingvon kaj certe aperigi ĝin en nacilingvaj gazetoj, ili petu la alsendon de la raporto kaj ili poste sendu eltranĉaĵojn de la gazetoj, kie ĝi aperis.

Mi esperas, ke ĉiuj perantoj kaj membroj komprenas la gravecon de tiu servo kaj komprenos la neceson taŭge funkciigi ĝin.

Gravan perdon suferis unu al niaj berlinaj aninoj. Kiam la berlina grupo vojaĝis al Wörgl por partopreni en la IJK, akcidentis iu junulo. Dum ke f-ino W. lin akompanis al la malsanulejo, neniu prizorgis ŝiajn havaĵojn, inter kiuj estis prunteprenita tendo. Kvankam la eraro estas ĉe la Berlina Junularo (la gvidantaro ja devis zorgi, ke ankaŭ la havaĵoj de f-ino W. estu prizorgataj), ni plene komprenas, ke simila akcidento konfuzus ankaŭ aliajn personojn. Tial kiel esceptan kazon ni konsideras la aferon kaj ni pretas fari kolekton en LJV, almenaŭ por la tendo, kiu ne estis ŝia propraĵo. Ĉu f-ino W. bonvolos al ni sciigi, kia granda estis la tendo, kiajn apartenaĵojn ĝi havis, ktp. Kaj ankaŭ la valoron de ĝi?

**FINANCA RAPORTO PRI LA 8a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO
EN RY, 10-17.8.1952.**

Enspezoj.	d.kr.	Elspezoj.	d.kr.
Kongreskotizoj:		Preparaj kostoj:	
71 pp po 75.— d.kr.		afranko	115.06
27 pp po 85.— d.kr.		500 invit.	100.50
2 pp po 60.— d.kr.		2000 aliĝiloj	52.—
1 pp po 40.— d.kr.	7780.—	Kaj Pedersen: vojaĝo	
por hotelo:		al Ry 29.12.'51	34.70
27 pp po 25.— d.kr.		transp. en Kbh. k	
1 pp po 14.30 d.kr.	564.30	Arhus	10.90
eksterkongresaj kotizoj:		rest. en Ry 9/10.8.'52	14.50
manĝo	146.50	Paul Jørgensen: rest.	
loĝo	18.—	en Ry, 13-14.8.'52	8.50
kotizo (adm.)	11.50	papero, kovertoj, ins.	36.90
lankovriloj	60.—	Michel Schmidt:	
	236.—	kostoj	48.—
Donacoj:		3 malaliĝintoj	30.—
3 pp po 10.— d.kr.		diverso	1.06
1 pp po 5.— d.kr.			390.—
3 pp po 1.50 d.kr.	39.50	Ry, Hojskole:	
La Turo-Komitato	400.—	99 pp po 57.—	
- 2 gastoj (ne-		1 pp po 45.50	
pagipovaj)	155.—	1 pp po 30.50	5719.—
	284.50	Por hotelo:	
Libro-Servo	34.78	22 pp po 25.— d.kr.	
		1 pp po 14.30 d.kr.	564.30
		eksterkongresaj	
		arang.	
		manĝo	146.50
		loĝo	18.—
		lankovriloj	60.—
			6507.80
		Programo:	
		ekskurso al Arhus	1154.50
		ekskurso al Silkeb.	400.—
		Kloster	20.—
		festvespero	20.—
		ekskurso al øm	
		internacia balo	15.—
		gajno al la T.J.O. kaso	1609.50
			392.28
	<hr/> <hr/>		<hr/> <hr/>
	8899.58		8899.58

La Brahmana Skribisto.

Iam Brahmano estis faranta kopian de sankta skribaĵo pri dio Kriŝna. Li venis al la verso, kiu tekstas, „Tiuĵ, kiuj fidas al mi, formetinte zorgon, ricevos de mi ĉion, kion ili bezonos, ĉar mi mem portos ĝin al ili.”

Sed kiam li atingis la vorton „**portos**” li ĉesis skribi kaj enpenŝiĝis. Post iom longa meditado li diris al sia edzino, „Ĉu ne estas malrespekte diri, ke dio Kriŝna mem **portas** objektojn? La skribaĵo devus diri „**sendos**” ne „**portos**”, ĉu ne?”

Lia edzino konsentis. La Brahmano do forfrotis la vorton „**portos**” kaj skribis anstataŭe „**sendos**”. La nova skribaĵo tial tekstis en tiu loko, „mi mem (Kriŝna) **sendos** ĝin al ili.”

Iom poste lia edzino raportis al la Brahmano, ke troviĝas en la domo nenia manĝaĵo. La skribisto tuj respondis, ke ili deyas ne malesperi sed fidi al Kriŝna. „Mi iros en la apudan ĉambron”, li diris, „kaj mi preĝos al li.” Li iris, kaj lasis sola la edzinon.

Post kelke da minutoj aperis ĉe la pordo tre bela junulo, kiu portis korbon; en kiu estis multaj bongustaj manĝaĵoj. La junulo proponis la korbon al la edzino, kiu post iom da hezitado danke akceptis ĝin. Tuj kiam ŝi estis transprenanta la korbon el la manoj de la junulo, ŝi vidis, ke lia brusto estis vundita per granda tranĉo. Kun profunda kompato la virino demandis, „Kiel vi vundiĝis?

Kiu tranĉis vin tiel?”

„Via edzo!” respondis la junulo. „Mia edzo?” mire ekkriis la virino, „sed tio estas neebla. Tiu vundo estas freŝa; ĝi ankoraŭ sangas, kaj mia edzo ne havas armilon, kaj li ne eliris el la domo dum horoj!”

„Tamen li ja faris tiun vundon - per sia malgranda armilo!”

La virino vokis al sia edzo, kiu tuj elvenis el la apuda ĉambro.

„Rigardu tiun vundon”, ŝi diris, montrante per sia fingro al la brusto de la junulo. „Li diras, ke vi faris ĝin per via malgranda armilo!”

„Mi certe ne”, li kolerete respondis, „mi ne eliris la domon, kaj ...”

Li ĉesis paroli, ĉar li ekvidis la korbon kun la belaj manĝaĵoj, kaj li rigardis rekte en la okulojn de la junulo, kiu ridetis al li, kaj tuj poste malaperis!

Tiam ili ambaŭ, la Brahmano kaj lia edzino sciis, ke la junulo estis Kriŝna, kiu mem **portis** al ili la bezonatajn manĝaĵojn. La malgranda armilo, per kiu la Brahmano vundis la bruston de Kriŝna, estis lia **plumo**.

Li reiris al sia manuskripto kaj, forfrotinte la malĝustan vorton, li skribis la ĝustan. Tiam li voĉe legis la verson kun danko en sia koro, „Tiuĵ, kiuj fidas al mi, formetinte zorgon, ricevos de mi ĉion, kion ili bezonos, ĉar mi mem **portos** ĝin al ili.”

LA LANCASHIRE KAJ YORKSHIRE ESPERANTA JUNULGASTEJANA GRUPO.

Ni invitas ĉiun eksterlandan Esperantiston kiu eble vizitos nian regionon, partopreni en niaj junulgastejaj semajnfinoj dum la vintro de 1953/54. Bonvole anoncu vin kiel eble plej frue ĉe la „patro” de la gastejo.

1953.

Nov. 14 HOLMFIRTH
Dec. 5 BURLEY WOOD HEAD

daŭrigo sur paĝo 21

SUB LA ĈIELO BERLINO.

Rapidege nia aŭtomobilo sekvas la rubandon de la aŭtovojo. Monotone bruas la motoro. Antaŭ ni nur la lumradioj de la lumigiloj trapenetras la noktan malhelecon. La rapidecmezurilo montras 120 kilometrojn pohore. Antaŭen, ĉiam antaŭen! Fluge ŝanĝiĝas la pejzaĝoj ĉe la flankoj de la strato

Jen en la malproksimeco videbliĝas ruĝaj lumoj antaŭ ni: la turo de la radiostacio de Berlino. Post kelkaj kilometroj barilo trans la strato. Halto. Pasportkontrolo ĉe la zona limo. Ĉio en ordo! La barilo leviĝas. La motoro denove ekbruas. Ni estas en Berlino.

Ion poste mi staras apud la alta ŝtalkingstruaĵo de la radioturo. Super ĝi brilas la steloj. Tiam kaj tiam aŭtomobilo pasas la straton. Krom tio nenio. Berlino dormas. - Malrapide mi iras laŭ la malluma strato, kaj mi rememoras tiun tagon, kiam mi alvenis la unuan fojon en tiu ĉi urbo. Pasis jam longa tempo de tiam. Printempa tago ĝi estis. Post longa veturado fine la trajno,

reduktante la rapidecon, enveturis la stacidomon. Iu stranga sento kaptis min tiam. Sed subite mi jam staris inter la tien kaj tien rapidantaj homoj kaj mi unufoje sentis la iel unikan atmosferon de Berlino, kiun mi trovis en neniu alia urbo.

Tiom da belaj tagoj mi tiam travivis en tiu ĉi urbo. Iomete malĝoje kaj sopire, sed tamen feliĉe mi devas rideti, rememorante tiun tempon. Tiel bone mi ja ankoraŭ memoras ĉiun tagon kaj ĉiun grandan kaj malgrandan travivaĵon. Estis la plej feliĉaj tagoj de mia vivo, kiujn mi pasigis ĉi tie, sub la ĉielo de Berlino. Tiel ofte dum la pasintaj monatoj en solecaj vesperoj min kaptis sopiro, kaj tiel ofte mi denove vidis antaŭ miaj okuloj la larĝajn bulvarojn kun iliaj miloj da lumoj kaj ĉion, ĉion ...

„Estas printempo en Berlin' ...”
Marŝante tra la malhelaj stratoj mi mallaŭte kantas tiun melodion por mi mem. Denove la rado de la sorto ekmoviĝas. Super mi brilas la steloj. ... kaj Berlino dormas.

Pedro.

daŭrigo de paĝo 20

1954.

Jan. 23	HAWORTH
Feb. 20	LINTON
Mar. 20	LEAM HALL*
Apr. 10	INGLETON

*oni anoncos pri la somera programo.

ALIAJ AFEROJ.


Okt. 24 - PATELEY BRIDGE.

por subtera esplorado de Stump Cross Kavernoj.
(portu vestaĉojn!)

Nov. 7an. Festofajro ĉe Luddenden Dean Tendarejo apud Halifax, Yorkshire.
Bonvole skribu al J. Sykes por ricevi informon.

J. SYKES, 13 South View,
Whitegate Top, HALIFAX, Yorkshire, ANGLUJO.
(por biciklistoj).

L. CHADWICK, 101 Acre Lane,
OLDHAM, Lancs, ANGLUJO. (pedirantoj).



KORESPOND- ADRESOJ

Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Ĉeĥoslovakujo: Jaroslav Bily, instruisto, Severní I.-9. Praha 13-Sporilov, dez. kor. kaj interŝ. p. m. la kovertojn de unua tago kaj et. de alumetskat. kun la tuta mondo. Resp. certa.

Nederlando: Ria v. d. Outenaar, Merkmanstr. 5. Haarlem, dez. kor. kaj interŝ. p. m. kun ĉiuj landoj.

Anglujo: Geknaboj (12-16 j.) dez. kor. kaj interŝ. uz. p. m. La Esperantista Klubo, Beaconsfield, Terrace, Town End, Bodmin, Cornwall.

Germanujo: 13-15 j. knabinoj dez. kor. kaj interŝ. bildkartojn kun samaĝaj geamikoj en tutmondo. Bv. skribi al S-ino Lilo Schmidt, Am Messplatz 1. MANNHEIM. Ni certe respondos.

Daŭrigo de La Burĝono:

„Ve, ve, lasu min foriri, sinjoro Krokodilo. Mi ne plu ĝenos vin.”

La maljuna krokodilo tiris, tiregis la nazon de Dombo.

„Panjo, panjo, helpu!” kriis Dombo pri helpo.

La patrino de Dombo estis malproksime, ŝi nenion aŭdis.

SinJORINO Serpento dormis sur alta arbo. La helpkrio de Dombo vekis ŝin. Ŝi vidis la danĝeron en kiu Dombo estas.

„Vi malsaĝa Dombo”, ĝi riproĉis, „kial vi fidas la maljunan krokodilon? Ĝi manĝos vin.”

Dombo ektimis.

„Mi ne volas esti manĝata! Helpu, helpu do!”

Kaj SinJORINO Serpento helpis. Ŝi pikis la nazon de la maljuna krokodilo, la maljuna krokodilo malkaptis la nazegon de Dombo kaj Dombo falis. Bedaŭrinda Dombo ploris pro doloro.

Najbaro krokodilo malaperis en la loĝejo.

„Ne ploru Dombo”, diris SinJORINO Serpento, „iru al via patrino.”

Dombo ploris. La nazo tre-tre doloris.

Kiam la patrino vidis Dombon, ŝi ektimis.

„Kio okazis al vi, mia infano?”

Kaj Dombo rakontis. La patrino iris kun Dombo al la elefanto-kuracisto. Sed kion ajn la kuracisto faris, la nazo de Dombo restis longa. Ĝi estis ek de tiu tempo rostro.

Ankaŭ la infanoj de Dombo ricevis rostron. Kaj ankaŭ la infanoj de la infanoj de Dombo.

Fine al ĉiuj elefantoj en Afriko, en Azio kaj ĉie sur la mondo kreskis rostro. Kaj ili trumpetas per ĝi, kiam minacas ia danĝero.

la burgono

MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



Kial havas la elefantoj longan rostron?

Iam, antaŭ multaj, multaj jaroj la elefantoj ne havis rostron. Ili havis nur simplan dikan nazon. Ili vivis feliĉe en la praarbaroj.

Sed tiam okazis io. Patro elefanto kaj patrino elefanto ricevis infanon. Ĝi estis ĉarma, malgranda kaj ĉika elefantido. Ĝia haŭto estis glata kiel veluro, la koloro de la haŭto estis bele griza.

La gepatroj tre amis sian infanon. Oni ĝin nomis Dombo.

Ankaŭ Dombo tre amis siajn gepatrojn. Ĝi kreskis, kreskis kaj volis esti granda, saĝa elefanto. Kaj ĝi volis multon lerni, ĝi volis ĉion scii. Malgranda Dombo estis tre scivola, ĝi demandis dum la tuta tago.

Foje ĝi demandis la patrinon:

„Panjo, ĉu loĝas ankaŭ en aliaj landoj elefantoj?”

„Jes, mia infano”, respondis la patrino.

„Panjo, ĉu ĉiuj elefantoj estas grizaj?” demandis Dombo.

„Jes, Dombo, ĉiuj elefantoj estas grizaj”, diris la patrino.

„Panjo, kial estas la elefantoj grizaj? Kial ili ne havas striojn, kiel la zebroj?” volis scii Dombo.

Sed la patrino ne sciis tion. Kaj neniu povis al la juna elefanto tion diri. Tial ĝi mem volis ĉion esplori.

Ĝi tre ofte promenis sola, en la dezerto, en la praarbaro, laŭ la rivero. Foje ĝi vidis struton. La struto havis longajn kruojn kaj malgrandajn flugilojn.

Dombo longe rigardis al la struto. Poste ĝi demandis:

„Sinjoro Struto, kial vi havas tiajn longajn kruojn? Mia patrino rakontis, ke vi estas birdo. Kie estas via nesto? Kial vi ne povas flugi?”

La struto pensis, ke Dombo volas moki ĝin. Ĝi rigardis tre kolere kaj ĝi frapis Dombon per la beko.

Dombo estis malĝoja. Kial ĉiu estas kolera? Ĝi ja volas nur scii, kia estas la mondo.

Ĝi promenis plu kaj ĝi vidis zebbron. Dombo ĝojis. Ho, nun ĝi povos demandi, kial la zebroj havas strion kaj la elefantoj ne.

Dombo salutis ĝentile la zebbron.

„Najbaro Zebro, kial vi havas tiajn belajn striojn? Kaj kial ni elefantoj ne havas?”

La zebro pensis, ke Dombo primokas ĝin. Ĝi piedfrapis Dombon per sia hufo.

Dombo estis eĉ pli malĝoja, ol li estis post la frapo de la struto. Ĝi iris hejmen al sia patrino. La patrino ĝuste kuiris la tagmanĝon.

„Panjo, kion manĝas la krokodiloj?” demandis Dombo.

La patrino rigardis al Dombo kaj ne respondis. Ŝi ne sciis tion. Ŝi estis kolera, ke Dombo ĉiam ion demandas. Ŝi diris al Dombo:

„Vi estas malbona infano, Dombo. Vi ĉiam ĝenas min. Bonvolu silenti, mi devas kuiru. Paĉjo baldaŭ venos por tagmanĝi.”

„Sed panjo, mi volis nur scii

La patrino ne volis aŭskulti.

„Se vi volas scii, kion la krokodiloj tagmanĝas, iru kaj demandu.”

Tio estas bona ideo, pensis Dombo kaj ĝi foriris. Ĝi iris al la rivero. En la rivero loĝis multaj krokodiloj.

Ĉe la riverbordo vokis Dombo:

„Sinjorino Krokodilo, ĉu vi estas hejme?”

Mallaŭta grumblado estis la respondo.

„Sinjorino Krokodilo, mi ŝatos ion demandi al vi!” vokis ree Dombo.

„Kiu ĝenas min?” grumblis la krokodilo.

„Mi estas ĉi tie, Dombo”, respondis la elefantido.

Najbaro Krokodilo persone venis al la pordo.

„Kion vi volas?”

„Mi volas demandi Sinjorinon Krokodilo, kion vi kutime tagmanĝas?” flustris Dombo.

Najbaro Krokodilo eliris sian loĝejon. Ĝi vidis la junan, grasan elefantidon kaj ĝi pensis: „vi estos bona tagmanĝo por mi” sed ĝi nenion diris laŭte.

Dombo ricevis iom da kuraĝo. Ĝi denove demandis:

„Sinjoro Krokodilo, ĉu vi volas al mi diri, kion vi tagmanĝas kutime?”

„Venu pli proksimen, etulo, mi flustros tion al vi”, flatis la maljuna krokodilo.

Dombo venis kaj la krokodilo kaptis ĝian nazon. Ĝi volis tiri Dombon en sian loĝejon.

„Aŭ, ho ve, vi faras al mi doloron”, plendis Dombo.

La maljuna krokodilo eĉ pli forte tiris la nazon de Dombo.

„Ne tiru min, tio doloras al mi!” petis Dombo la krokodilon.

Sed tiu ne aŭskultis. Ĝi tiris la nazon de la elefanto.